

50-jara jubileo de trista evento
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 februaro 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

La okcidenteŭropanoj, inter kiuj tutcerte spirite troviĝas ankaŭ la svisoj, tendencas rigardi kun konsterno al la landoj nun travivantaj civilajn militojn. Estas neimageble al ili, ke la popoloj de tiuj nacioj, anstataŭ uzi perforton, ne kapablas demokrate diskuti siajn problemojn. La okcidenteŭropanoj ekkonsciis, ke militaj agoj kondukas nur al ofte neripareblaj detruoj, dum debatoj iom post iom malkovrigas solvojn por ĉiuj konfliktigaj problemoj. Tiu kreskanta fido je la pozitivaj rezultoj de demokrataj debatoj kaj malfido je la daŭrigo de la perfortemaj politikoj, estas tutcerte unu el la pozitivaj rezultoj de la aktivecoj ege konstruaj de la brusela Eŭropa Komunumo kaj de la strasburga Eŭropa Konsilio.

A.- Sed ni ne forgesu, ke la debatemo, kiu anstataŭis en Okcidenta Eŭropo la atakemon, estas nova politika fenomeno. Se ni rigardas nur duonjarcenton malantaŭen, kion ni vidas? Kio okazis en Eŭropo komence de la jaro 1942-a?

Cl.- Ni vidas ĉie armeajn agojn kaj la venkon de diktaturaj reĝimoj, kies ĉefgvidantoj troviĝas en la nazia Germanio. Kaj ĝuste en la komenco de la jaro 1942-a, ekzakte je la 20-a de januaro 1942-a, decidiĝis en Wannsee apud Berlino la fina solvo por la juda problemo. Dekkvino da altranguloj, kiuj reprezentis diversajn germanajn administraciojn, prenis sekrete monstran decidon. Ili estis SS-anoj, kancelieroj, naziestroj, ŝtatministroj pri internaj aferoj, pri justico kaj pri okupitaj teritorioj, sekretarioj pri eksteraj aferoj, kiujn kunvokis Adolf Eichmann por ebligi al Reinhard Heydrich transdonon de dekreto de Adolf Hitler. Ni estas en hierarkia socio. La nazia imperio estas giganta armeo. La supera gvidanto pensas ĉion kaj obeemaj subgvidantoj komunikas la frukton de tiu penso al obeemaj administraciantoj, kiuj planadas ĉion ĝis la plej etaj detaloj por la efektivigado de la projektoj. Nelacigeble kaj ofte kun granda entuziasmo kaj sindono ili konstruas novan Eŭropon, kiu obeos al nova moralo.

A.- Kio estis la tagordo de la menciita kunveno de la 20-a de januaro 1942. Ĝi celis anonci, ke laŭ la decido de la supera gvidanto ĉiuj judoj vivantaj en la teritorioj regataj de Germanio aŭ de ties submetitoj estos transportitaj al laborrestadejoj en orientan Eŭropon. Tie antaŭ ol morti, ilia sorto estos sklavlabori je la profito de la nazia imperio. Tute klare temis pri la mortplanado de proksimume 11 milionoj da homoj. Fakte ĝis 1945 la nazia reĝimo havis la tempon pereigi jam 6 milionojn da ili. La murdoritmo estis do je po du milionoj en jaro. Kaj en 1942 jam desegniĝis la postjuda eksterminado de aliaj gentoj minoritataj aŭ malbonvenaj.

Cl.- Kaj ni ne forgesu, ke antaŭ ol okupiĝi pri la fina solvo juda, Hitler efektivigadis la mortigon de sepdekmil germanoj ĉu mensmalsanaj, kriplaj aŭ kadukaj. Ne ribelis la maljunulejaj kaj malsanulejaj estroj kontraŭ tiu unua ekzerco elpurigi la germanan popolon je malindaj elementoj. Entuziasme multaj plenumis sian neniigan taskon. Tiu unua popolpurigado estis unua ekzerco. Perfektiĝis la iloj kaj en 1942 pli vastskala agado povis esti entreprenita.

A.- En sia Tagĵurnalo Adolf Eichmann, la aŭtoro de la protokolo de la renkontiĝo en Wannsee apud Berlino, rakontas, kiel post la kunveno mem ĉe kamenfajro li daŭrigis kun Heydrich

Müller kaj kelkaj aliaj altfunkciuloj la amikan diskuton pri la manieroj elimini la judojn. Sprito, ĝojo kaj ŝercoj vigligis tiun memorindan kunsidon.

Cl.- La dramo de la judmortigo troviĝas en tiu etoso: Fervoraj funkciuloj interdiskutis kun ŝercemo pri la plej taŭga maniero ekstermini 11 milionojn da homoj. Fakte ilia plej granda priokupo estis: kiel neperfidi la sekretecon mem de agado. Ĝi estis fakte neniam publike menciita, krom per kelkaj aludetoj, eŭfemismoj aŭ ĉirkaŭparoloj.

A.- La formulo "fina solvo" tiel anstataŭis la vorton eksterminado, kaj anstataŭ diri mortigi, oni pli civilize preferis la esprimon "trakti laŭ konsekvenco". Tiel kreiĝis ĵargono, kiun reale nur komprenis kelkaj altfunkciuloj. La aliaj simple plenumis sian taskon. Kaj eliminiĝis ĉiuj ĝenuloj, kiuj hezitis ludi sian rolon pro eksaj religiaj aŭ politikaj antaŭjuĝoj. Estis necese elpurigi la socion je ĉiuj rezistoj kontraŭ la nova ordo.

Cl.- Tunoj da dokumentoj estis kolektitaj post la falo de la nazia imperio, sed malmultaj dokumentoj konkrete respegulas la sekretajn decidojn kaj diskutojn de la 20-a de januaro 1942. Tial malhonestaj intelektuloj hodiaŭ provas demonstri, ke neniam estis decidita la eksterminado de la judoj kaj ke mortrestadejoj ne ekzistis. Tiuj pseŭdohistoriistoj simple atestas per siaj argumentoj kaj verkoj, ke ili pretus pluagi en la linio de la hommurdebla naziismo.

A.- Sed ekzistas pli kuraĝaj kaj veramaj historiistoj. Nuntempe kaj ĝis la 26-a de aprilo estas vizitebla en Berlino ekspozicio titolita "Jüdische Lebenswelten", kion ni povas esperantigi per "La mondoj judaj". Tiu ekspozicio objekte raportas pri la kompleksa historio de la judoj tra la tempoj kaj en la diversaj partoj de la mondo. Du katastrofojn ĝi priskribas: la murdon de ses milionoj da judoj precize ekprogramita la 20-an de januaro 1942 fare de la nazia reĝimo kaj la forpelon de la judoj el Hispanio decidita la 31-an de marto 1492 fare de la katolika reĝo Ferdinando de Aragono, do antaŭ kvincent jaroj.

Cl.- "Eĉ ĉiuj urboj en la mondo, por la judoj, Berlino estas la plej tragika historie" skribas Torsten Mass, la organizanto de la ekspozicio. Tial estas bone, ke Berlino ĝuste decidis prezenti tiun ekspozicion pri la judaj mondoj, ekspozicion kiu ne nur raportas pri suferoj ofte malfacile elteneblaj, sed ankaŭ pri la genio kaj la forto de tiu gento. Per pli ol dumil dokumentoj el plej diversaj devenoj montriĝas la hebrea popolo submetita al persekutoj kaj retrovanta sian energion kaj riĉiganta la vivon kulture, politikan kaj ekonomian en la regionoj, kien ĝi povis reunuiĝi.

A.- Inter 1942 kaj nun kvindek jaroj vidis grandajn pozitivajn ŝanĝojn en Eŭropo. Nian kontinenton estus povinta unuigi la nazia imperio. Nun ne plu ekzistus limoj, kaj eble jam ekde pluraj jaroj regus nur unu sola monunuo, unu sola registaro, unu sola juro, eble eĉ unu sola lingvo. La juda problemo estus delonge solvita per la neniigo de la koncerna gento. Kaj aliaj gentoj estus konintaj saman sorton.

Cl.- Ĝojige alian Eŭropon ni konas, kaj ni neniam forgesu, ke ĝian konstruon ni ŝuldas al kuraĝaj homoj kiel Monnet, Schumann kaj Adenauer, kiuj iniciatis supernaciajn strukturojn. Grandioza estas la historio de la kreo de Komuna Merkato pri Karbo kaj Stalo, kiu komence kunlaborigis ses ŝtatojn. Eŭropa Komunumo iom poste naskiĝis. La naciismaj ŝovinismoj moderiĝis profite al eŭropa juro pli kaj pli efika kaj demokrata. Eŭropo unue abstrakta espero al paco fariĝis nun por la junularo realaĵo ofte pli vivanta, ol la regionaj patrujoj, kies

militplenaj historioj estas konsiderataj kun kreskanta malestimo. Je la eniro de la 21-a jarcento Eŭropon konkretigos komuna monunuo kaj disfalo de la lastaj internaj doganaj baroj.

A.- Ĉion tion ni ŝuldas al kuraĝaj pioniroj kaj miloj da funkciuloj ofte misprezentitaj kaj fikritikataj de la naciistoj, kiuj provas kontraŭstari tiun evoluon al supernacia Eŭropo dekduŝtata, kiu tutcerte pli kreskos, ne per militaj agoj, sed per la aliĝemo de aliaj ŝtatoj, inter kiuj troviĝas Svislando.

Cl.- La dudeka jarcento historie rakontos la finon de la perarmeaj unuiĝoj, kiuj monstriĝis en la nazia, stalina kaj aliaj sistemoj kaj la komencon de aliaj unuiĝoj packonstruaj, kiel Eŭropa Komunumo kaj Uno, por mencii la du ĉefajn, kies membro bedaŭrinde ne estas Svislando ĝis nun.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis Claude kaj Andrée GACOND. Ĝis la reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), decembro 2012